

Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭdon la 24-an de septembro 2015 per Skype.

(Protokolo aprobita la 29-an de oktobro 2015.)

Partoprenis:

Amelie Matt en Tromsø
Anne Karin Bondhus en Bryne
Hilde Dahlberg en Mo i Rana
Mario Machlik en Tromsø

0. Tagordo

Aprobita.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 20-an de aŭgusto

Aprobita.

2. Ekonomio

La kasisto raportis pri la ekonomio: Skagen Vekst kr 46 407,- Skagen Høyrente kr 127 377,-

3. Landa Kongreso 2015, farendaĵoj post la apero de la protokolo

La protokolo de la Landa Kunveno pretiĝis kaj ĝia koncizigita versio aperis en nia membrogazeto. La subskribantoj subskribis la dokumenton kaj la originalon ni konservu en nia oficejo. Douglas Draper sendu la skanitan dokumenton al la estraro.

Ni devos zorgi pri tio, ke la jarraportoj kaj la laborplano estu korektitaj laŭ la intenco de la Landa Kunveno, kaj tiel afiŝitaj en nia hejmpaĝo. Anne Karin laboros pri la ĉesigo de la konto de la malnova E-nytt, kiam la nova estraro estos anoncita ĉe *Brønnøysundregisteret*. Ŝi kontaktos ankaŭ Ulf Stenhaug por ekhavi lian revizoran raporton pri la jarkalkuloj.

4. Landa Kongreso 2017

Tiun punkton nun ni ne traktis, ĉar Ulf Lunde ne ĉeestis la interkonsiliĝon. Li eble povus havi gravan rolon pri la organizado.

5. Informado en la norvega

Mario prezentis la aŭtunan numeron de Esperanto-nytt. Pri la enhavo ne venis kritiko, sed la aspekton ni povus plibonigi. Amelie havas planojn pri tio. La dissendadon ni faros ĉefe pere de NEL-inform, sed kluboj, kiuj havas propran retliston sendu ankaŭ tiel. Iom post iom ni devas kolekti la retadresojn de interesiĝantoj. Ŝajne en nia membroregistro ankoraŭ ne ĉiuj estas registritaj kun retadreso.

Anne Karin sendos skanaĵon de tiu franca broŝuro, kiun ŝi prenis hejmen de la UK.

Ni diskutis eblecon produkti malgrandajn reklamkartojn (vizitkartojn) laŭ la ekzemplo de la jubilea kampanjo Esperanto125. Tiam tiuj kartetoj kostis malmulte ĉe Vistaprint. Mario esploros la aferon.

6. Retmesaĝo de domkomisiano

Torstein Kvakland respondis al niaj demandoj. Li ne vidis iun kontrakton pri luigado de Esperantonia. Laŭ li estas malfacile plenumi la taskojn de domkomisiano, sen havi statuton.

Ni decidis inviti al la venonta interkonsiliĝo Cato Haugen (prizorganto de la domo), Kjell Peder Hoff (domkomisionano, elektita de la Oslo klubo) kaj Douglas Draper (deĵoranto en la oficejo) por klarigi la situacion.

7. Eventualaĵoj

Nenio

La interkonsiliĝo daŭris 19:30 - 20:30

La venonta interkonsiliĝo okazos la 29-an de oktobro 2015.

Raportis Mario Machlik